

Numero: 228.
Majo 2011.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

La nova turo de Babelo

Ĉiutage ni konstruas novan babelan turon. Ni deziras atingi la ĉielon, eĉ pluen. Vere ni neniam atingas ĝin, ĉar la turo terenfalas. Pro la multe da lingvoj ni ne komprenas unu la alian. Ni nur balbutas serĉante komunan lingvon.

Ĉiam estas mondlingvoj, kiujn ni nepre devas ellerni. Tio ŝanĝiĝas laŭ la politikaj influoj.

Hurauloj nuntempe fanfaronas, la lingvoproblemo estas solvita, ĉar jam la angla lingvo tiom disvastiĝis en la mondo, ke ankoraŭ kelke da jardekoj, kaj ĉiu parolas kaj komprenas tiun ĉi lingvon.

Min interesus, ĉu efektive la angla lingvo ĝuas privilegecon inter la lingvoj? Kiu esploris, ĉu ĝi vere povas plenumi la rolon de la tuttera mondlingvo.

La homoj kiuj devas scii la anglan lingvon, kiom grade ili scias ĝin? Ĉu ili facile povas uzi ĝin en ĉiu tereno, aŭ kiuj ne suĉas la anglan kun la patrinolakto, ili nur balbutas, kaj dum ilia vivo ĉiam restos duaklasaj civitanoj.

Pri tio ne pretiĝas statistiko.

Eble venos nova epoko kaj ankaŭ la angla malaperos, kiel multaj lingvoj en la historio de la homaro.

Nun ni konstruas novan turon, ĉar ni esperas, ke ĝi estos finkonstruita. Mi scias, ankaŭ ĝi terenfalos en iu tago, kaj ĉio komenciĝos denove.

Tio estas la problemo, ke la nova turo baziĝas sur unu nacia lingvo, kiu ne estas stabila. Ĉiam estos homoj, nacioj, kiuj ne agnoskas tiun ĉi fundamenton kaj volas alian pli fortan. Tiuj ĉi homoj subfosas la fundamenton de la turo kaj vole-nevole la tuta konstruaĵo ekskuiĝas kaj falas.

Tiel okazas jam ekde jarmiloj. Venas novaj homoj kun novaj lingvoj, kaj ili komencas konstrui novan turon.

Eble ankoraŭ la homaro ne maturiĝis por konstrui turon, ĉar oni ne antaŭvidas, en la estonto ĉi turo devos stari sur forta fundamento kies nomo estas ESPERANTO.

-Redaktanto-



Mia kara lingvo Esperanto



Antaŭ kelkaj tagoj mi estis priridita pro Esperanto. Oni moke demandis min, kial ĝuste mi lernis ĉi tiun senutilan lingvon?

Ĉu vere la zamenhofa lingvo estas senutila?

Mi jam delonge ne diskutas, eĉ disputas por konvinki homojn, kiuj ŝajne estas la malamikoj de Esperanto.

Sed tiun ĉi diskuton mi ne povis eviti. Komence la mokantoj estis simpatiantoj kaj mi ne pensis, ke ilin vere interesas la internacia lingvo.

Por mi estas strange, ke multaj homoj kial estas kontraŭ Esperanto.

Kiu legas ĉi tiun eldonaĵon, tiu jam meditis pri tio? Kial pensi, Esperanto estas malutila kaj oni povas uzi ĝin nenie?

Tio estas malprava, ĉar per ĝi oni povas komuniki ĉie ajn en la tuta mondo.

Mi tre ŝatus, se nia amata lingvo nun jam vere okupus sian indan lokon inter la lingvoj. Tamen kion fari, se ekzistas homoj, kiuj ne kredas tion. Multaj el ili priridas nin, geesperantistojn.

Malgraŭ ĉiu malfacilaĵo ni persistas, kaj kiel nia majstro diris: „Ni semas kaj semas.” Multaj homoj ne kredas, ke ĉi lingvo fariĝos la dua gepatra lingvo de la homaro.

Ho kia belega estonto! Kiam falos la lingvaj bariloj kaj ĉiu homo komprenas unu la alian, ili vivu kie ajn en la mondo.

Ankaŭ la primokantoj ne estos kontraŭ ĝi kaj plurfoje ni geesperantistoj ne estos iliaj celtabuloj.

Espereble ĉiu vidos, tiu ĉi lingvo estas por ni kaj ĝi plifaciligos nian vivon. La estonto de Esperanto dependas de ni, homoj. Do, ni ne hezitu: lernu kaj uzu ĝin!

-Ŝaŝa-

La sekreto de kapelo

V.

Ili ambaŭ tre timis kaj eksidis sur la trotuaroborderon.

Longajn minutojn nenio okazis. Ili estis perdiĝintaj. Ili ne sciis, kiel iri hejmen. Eble nun jam ili restos en tiu mondo por ĉiam, kaj neniam ili povos hejmeniri.

Fine la pli alta ekstaris kaj komencis iri. La alia demandis kun surprizo:

-Kien vi iras?

-Mi ne scias. Sidante sur la trotuaro mi freneziga. Almenaŭ ni renkontus iun, sed ĉi tie vivas neniu krom ni.

-Ni atendu, eble iu ekaperos. Rigardu, en la restoracio ankoraŭ la manĝaĵo estas varma. Iu estis tie ĉi.

-Ĝi estas nur iluzio. Ni estas trompitaĵoj – diris la pli alta malgaje – Ni iru!

-Sed kien? Mi deziras iri hejmen. Ĉu vi rememoras pri la unua nokto kaj pri tiu timiga muĝado en la dezerto? Tiam iu aŭ io estis tie. Krome ni vidis viron ĉe la rivero sur la alia bordo.

-Jes mi rememoras. Kaj kio? Eble ankaŭ ili estis nur iluzio. Ĉi tie ĉio estas iluzio. Nu ek! Ni iru.

La urbo estis sufiĉe granda. Dum la marŝado ili longe ne parolis, fine la pli alta ekstaris kaj demandis:

-Kion vi volis diri pri la stranga muĝo kaj viro sur la alia bordo?

-Tiam mi sentis, ke oni atentis nin. Eĉ ankaŭ nun mi sentas sur ni iliajn okulojn. Ni ne estas solaj. Iel ni devus komuniki kun ili.

-Kredu min, ni estas solaj. Ni transiris en alian tempon kaj lokon. Ni estas en tempospiralo, de kie ni ne povas liberiĝi.

-Ne diru tion! Mi volas hejmeniĝi! La miaj atendas min hejme.

-Ankaŭ min, sed kion fari? Montru al mi la vojon ĝis hejmo. Ĉu vi scias pri kio mi pensis antaŭ kelkaj sekundoj?

-Pri kio? – demandis scivole la malpli alta.

-Eble estus pli bone, se ni farus sinmorton. Kiel vi opinias pri ĝi?

-Mi ne volas pensi pri ĝi. Min oni atendas hejme. Mi devas iri hejmen.

La pli alta ekridegis:

-Ĉu hejmeniri? Estus bone. Oh, tiu belega hejmo! Kie ĝi estas? Rigardu la urbon! Ĝi estas silenta kaj forlasita. Iliaj loĝantoj estas en alia dimensio kaj tempo. Ni neniam povas renkontiĝi kun ili. Ĉu mi malkaŝu al vi grandan sekreton?

-Jes. Mi aŭskultas vin. Diru!

-Efektive ni ne forlasis nian hejmon. Ankoraŭ nun ni estas tie, nur en alia dimensio kaj tempo.

Lia amiko haltis kaj serioze rigardis al li.

-Kiel vi pensas pri tio? – li demandis – Bonvolu klarigi ĝin al mi. Mi jam estas tute konfuzita.

-Ankaŭ mi, kaj efektive tiun ĉi situacion ni neniam komprenos



Ili denove ekiris. La domoj kaj konstruaĵoj estis senhomaj. Ili revis renkonti iun, tiu estu homo aŭ monstro, kiu kaŝsekvis ilin dum la unua nokto en tiu ĉi stranga mondo. Ĉe la rivero ankoraŭ estis iom da espero por ke ili povos komuniki kaj petos helpon. Sed la rivero disigis ilin, kaj ili ne povis iri sur la alian bordon.

Kiel ili iris plu, tiom elĉerpiĝis la espero kaj la forto.

Alveninte ĉi urbon ankoraŭfoje ekbrilis antaŭ ili la espero, ke ili povos hejmeniri, sed nun jam ankaŭ ĝi malaperis. Ili nur marŝas kaj marŝas sur la stratoj de la urbo.

Nun jam ili esperas nenion. Ĝis la lasta sekundo ili devos iri kaj serĉi la vojon, kiu kondukas hejmen.

Foje – foje ili haltis kaj tiuokaze ili diskutadis pri sia senespera sorto.

Ili ĉirkaŭiris la urbon plurfoje kaj kiam revenis al la restoracio ili esperis, ke iu atendos ilin tie kun bongusta manĝaĵo.

Manĝaĵo ĉiam estis trovita, nur la kuirinto malaperis. Tamen povis okazi, ke li aŭ ŝi estis tie nur ili ne vidis.

Ili sciis, ke neniam povos hejmeniri. Nun jam ili ĉiam vivos en tiu ĉi urbo. Estintus bone scii, ke tio estas nur sonĝo, sed ĉiufoje ili rekonsciiĝis, kiam rekonis, ĉio estas perdita. Ne estas espero liberiĝi el tiu ĉi diabla rondo.

Ili iris kaj haltis kaj ili denove ekiris dume sekrete esperis, ke la vojo estos trovita kaj iun tagon ili estos hejme kun siaj familianoj, kiel antaŭe.



Fino

-Apáti Kovács Béla-

Poezio

Poemoj de Yohanes Manhitu

Nova paĝo



Kiel malfermi novan paĝon
de taglibro ankoraŭ dika,
mi komencas novan tagon
jam sen vi, ho beleta mia.

Mi ne povas pagi la prezon
de la ĉeesto de sento riska.
Do mi petas vian komprenon
forgesi ĝin kvankam peza.

Neniam mi sentas feliĉon
pro decido korrompiginta.
Sed ni devigis tuj fari ion
malgraŭ prezo tre kosta.

Kiel daŭrigi longan vojaĝon
el stacio neniam atendita;
kvankam mi ne trovas ĝojon,
la radoj turniĝas, beleta mia.

Noemuti-Timoro, februare 2010



Silente mi ekkaptas la tagon



Kiam turniĝas ankoraŭ la tero
ĉirkaŭ la suno en la universo
kaj estas spirito en la korpo,
eblas ĉiutage surtera feliĉo.

Ekzistas momentoj de ĝojo
donataj de la ĉielo al la tero
por ke iu memoru kiel homo
la antaŭzorgon de la Kreinto.

Kiam venas jam la momento,
estas libereco por ĉiu persono
elekti kiel pasigi tiun ĉi okazon,
kiel al la momento doni signifon.

Estas bona tempo por ĉiu afero,
estas mil eblecoj por ĉiu okazo.
Havante senpostule liberecon,
silente mi ekkaptas la tagon.

Sufiĉas kandleto por lumeto
kaj ofera donaco el malsufiĉo.
Estas ja preĝeto por bonstato
kaj diaj versoj por ĉiama feliĉo.

Fotoj en albumego por memoro,
bufedo en restoracio por honoro
ne estas elektoj celitaj de la jaro.
La okazo postvivos en poemaro.

Jogjakarto, majo 2010



Por infanoj



La ororingo de la reĝidino

Kaj estis kaj ne estis trans la fabeloceano estis belega lando, kie vivis maljuna reĝo kun sia belega filino. Tiu reĝidino havis ororingon. Ĝin ŝi surhavis tage kaj nokte. Kiu vidis la ringon, tiu tuj ekmiris pro la surprizo, tiom belega ĝi estis.

La estis fieraj je sia ororingo, kaj ŝi montris ĝin al ĉiu.

Iun tagon okazis terura afero. La ringo malaperis, kiam matene la reĝidino vekigis.

Ŝi serĉis ĉie. La servistoj renversis la tutan fortikaĵon serĉante la valoran objekton. Vane serĉis ĝin ĉiu, la ororingo ne estis trovita.

La reĝidino ekploris, kaj pro ŝia plorego eĥis la tuta ĉirkaŭaĵo. Ĉiu kompatis la malfeliĉan reĝidino. Ŝia patro promesis al ŝi, ke li donacos al ŝi pli belan kaj grandan ringon.

La reĝidino ne deziris alian. Ŝi devigis, ke la ororingo estu trovita, ĉar se ŝi ne ricevos ĝin, tiam ŝi mortos.

La maljuna reĝo tre amis sian filinon, tial li tuj anoncis en la reĝlando, kiu trovos la ororingon, tiun li riĉe premios.

La tuta reĝlando ekscitiĝis, kaj ĉiu serĉis la ororingon. Ili serĉadis sep tagojn kaj sep noktojn, sed ĝi ne estis trovita.

Kiam jam preskaŭ ĉiu rezignis, malgranda hometo alvenis al la fortikaĵon kaj li diris:

-Mi serĉos la ororingon, se mi povos edzinigi vian belegan filinon.

La reĝon surprizis la peto, sed li jam ne povis elteni la ploregon de sia filineto. Li akceptis la kondiĉojn de la hometo. Ili manprenis kaj la hometo tuj ekiris por serĉi la ororingon.

En la fortikaĵo neniu pensis, ke li povos trovi ĝin, sed ĝis la suno malaperis malantaŭ la altaj montopintoj, la hometo revenis portante la ringon.

La korteganoj ekmiris, kaj ili ne volis kredi al siaj okuloj.

-Mia reĝa Mosto – diris la hometo – jen estas la ororingo de via filino.

Ĝoje venis la reĝidino, kaj ŝi transprenis sian ŝatatan ringon. Ŝi estis tre feliĉa kaj dankegis al la trovanto.

La reĝo ankoraŭfoje demandis, kiel li rekompencu tiun ĉi gravan servon?

-Mi jam manifestis mian deziron. Bonvolu edzinigi al mi vian filineton.

-Mi donas al vi tri sakojn da oro, tri sakoj da arĝento kaj tri sakojn da diamantoj, nur lasu al mi mian filineton – diris la reĝo, ĉar li jam pripentis la facilaniman promeson.



La hometo estis tro malgranda al la reĝidino kaj kiel oni opinios pri lia bofilo. Certe ĉiu ridos pri la nova geedza paro. Tial li decidis, ke li malhelpos la geedziĝon.

Sed ve! La hometo ne akceptis la sakojn kun multege da trezoroj. Li volis nur la manon de la reĝidino.

-Mia reĝa Moŝto – li diris – se vi ne donos al mi vian filinon, tiam mi ruinigos vian fortikaĵon.

Aŭdante tion la reĝo li laŭte ekridis:

-Kiel vi povus ruini tiun ĉi grandegan fortikaĵon? – li demandis mire – Se vi ne akceptas mian donacon, tiam mi ege bedaŭras, vi devas forlasi la fortikaĵon senpage. Dume mi ŝanĝigis mian promeson, mi ne edzinigos al vi mian unusolan filinon, ĉar vi ne konformas al ŝi. Serĉu alian knabinon por vi!

Tio tre kolerigis la hometon, kiu tuj malaperis. La reĝo estis tre kontenta, ke sukcesis liberiĝi de li, kaj ankaŭ la ororingo de lia filineto estis trovita.

Matene la reĝo vekigis je strangaj bruoj. Kvazaŭ mil masonistoj estus laborantaj ĉe la fortikaĵomuroj. La reĝo tuj eksaltis kaj kuregis al la fenestro. Li preskaŭ svenis pro la surprizo, ĉar efektive ekstere ĉe la muroj mil masonistoj malkonstruis la fortikaĵon.

La reĝo vokis la soldatojn. Ili ĉiuj malaperis kun ĉiuj loĝantoj de la fortikaĵo. Nur li restis tie sola. Vane li petegis, ke la masonistoj ne malkonstruu la fortikaĵon. La hometo ne aŭskultis la petegon de la reĝo, kiu promesadis, ke li donos al li sian filinon. La fortikaĵo estis malkonstruita ĝis la fundo. La malfeliĉa reĝo devis formigri, ĉar li tre hontis antaŭ sia popolo.

Neniu sciis, kien li formigris kaj kie li estas nun. Eble ankoraŭ nun li migras ie. Se hazerde vi renkontos lin, sciu, li estas tiu reĝo, kiu trompis la hometon.

Ellernu el mia fabelo, se vi promesis ion, tiam ĝin plenumu kaj ne trompu vian partneron!

-Onklo Adalberto-



Gajaj bildoj



Aŭtomato



Sen teksto



Impostokontrolisto



-Manjo, ĉu vi estas virgulino?
-Ankoraŭ ne.

